


La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

Ĵaŭdon, la 2-an de Julio, 2015 • numero tri

Hodiaŭ • Today

★ 8:30 – 12:15 atm
Lecionoj / Classes
Flowe, unua etaĝo



★ 2:00 – 4:30 ptm
KTF-programo: filmado, en Flowe
Dum tiu ĉi tempo okazos filmado por la Kino-Teatra Festivalo kun Ĵenja, Derek, kaj Karlo en la unua etaĝo de *Flowe*. Vi povas partopreni en la filmado aŭ nur sidi kaj spekti, se vi preferas. Se vi ne interesiĝas pri filmado, ni okazigos alternativan programon samtempe:

★ 2:00 – 3:30 ptm, *Flowe*
Tabulo-ludoj: venu kaj venku!
Hoss gvidos kelkajn tabuloludojn (angle: *board games*) ankaŭ en klasĉambroj de *Flowe*. Se vi havas kun vi proprajn ludojn, kunportu ilin kaj instru al aliaj. Hoss prezentos tri ludojn: *Vorto-Mozaiko* el Japanujo, *Skrablo* (esperantigita versio de la anglalingva *Scrabble*) kaj *Mi trovis!* (esperantigita versio de la angla *Pictureka!*)

★ 7:00 – 8:00 ptm, en *Flowe*
Laborsesio pri tradukado
George BAKER kaj Ĵenja BONDELID daŭrigos la KTF-programon per prezento pri tradukado en filmfarado.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Finley 112

<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al:

<nask.esperanto@gmail.com>

Sendependa... sed dependa

de Paul GUBBINS

“Internacia magazino sendependa”: jen vortoj legeblaj kovrile de la novaĵ-magazino *Monato*, kiu enhavas raportojn pri diversaj temoj verkitaj de korespondantoj tra la tuta mondo. Unikas *Monato*, ĉar ĝi ne pritraktas movadajn eventojn, kiaj kongresoj kaj eĉ kursaroj (ekz. NASK), sed okupiĝas pri politikaj, sciencaj, sociaj kaj aliaj temoj. Alivorte, ĝi estas peresperanta, ne priesperanta revuo.

Gravas *Monato*. Kiam mi eklernis Esperanton, antaŭ multaj jaroj, mi ĉerpis el ĝiaj paĝoj ĝuste la vortprovizon, kiun mi volis, por preparoli mondajn eventojn. Nuntempe lingvo-sciencistoj trakribas ĝiajn artikolojn por krei t.n. korpuson kaj esplori, kiamaniere tiu aŭ alia vorto aŭ frazero estas uzata. Sendube *Monato* efikas sur nunan lingvo-uzon de Esperanto – kio surŝultrigas al mi, ĉefredaktoro de la magazino, enorman respondecon. Se mi allasas dubindan parol-turniĝon, ĝi riskas eniri la korpuson, tiel ke poste oni diros: Nu... oni uzis en *Monato*. Devas esti en ordo.

Monato alimaniere unikas. Kontraste al nacilingvaj gazetoj kaj televidostacioj, kiuj raportas de kaj pri eksterlando ĝenerale uzante nacilingvajn korespondantojn, *Monato* insistas, ke nur tiuj, kiuj vivas en koncerna lando aŭ regiono, ĝin priraportu. Tio signifas, ke legantoj vidas ne per la okuloj de sia samlandano sed per tiuj de vera enloĝanto – iu, kiu funde kaj profunde konas la landon, sendube multe pli intime ol fremdlanda kaj fremdlingva raportisto tien paraŝutita. Krome *Monato* ne aperigas tradukitajn artikolojn aŭ tiujn ne ekskluzive verkitajn por ĝi. Tiamaniere ankaŭ konservendas ĝia unikeco.

Tamen ni ne vivas en perfekta mondo. Foje oni riproĉas al *Monato*, ke legeblas en ĝi nur pri malgrandaj, apenaŭ konataj landoj, dum la plej gravaj kaj potencaj tre malofte aperas inter ĝiaj kovriloj. Enestas en la aserto iom da vero: tamen nepras



indiki, ke grava lando, kia Japanujo, relative ofte estas pritraktata en la magazino. Aliflanke – kaj jen almenaŭ parte la celo de tiu ĉi artikolo – aliaj potencaj kaj influaj landoj, kiaj Usono, tre, tre malofte estas reprezentataj.

Kial? Simple, ĉar *Monato* dependas de siaj korespondantoj. Ne neblas, ke en kelkaj landoj vivas pluraj, tre entuziasmaj korespondantoj, kiuj regule, foje senbride, kontribuas al la magazino. Paradokse, en aliaj, geografie kaj demografie pli imponaj ŝtatoj, mankas ĉi tiu entuziasmo. Rezulto: hontinda malekvilibro en la vidateco de landoj priraportataj en *Monato*.

Tiel la sendependa magazino *Monato* dependas ne nur de siaj abonantoj sed ankaŭ de siaj korespondantoj. Se neniu enloĝanto verkas pri tiu aŭ alia lando aŭ regiono, ĝi ne aperas en *Monato*. Ekzemple mi, kiu pasigas du semajnojn en Usono, ne arogus al mi la rajton fariĝi kvazaŭ eksterlanda korespondanto kaj ekartikoli por *Monato* pri aferoj en ĉi tiu lando. Se neniu usonano ekverkos pri sia lando, ĝi ne estos pritraktata en la magazino.

Pro tio mia peto. *Monato* kaj ĝia tutmonda legantaro bezonas viajn raportojn el via lando. Ne necesas esti trejnita ĵurnalisto, sed esperantisto, kiu volas informiĝi pri aktualaj eventoj en sia lando. Krome ne necesas longe artikoli aŭ eĉ eseumi: eblas kontentige priraporti eĉ la plej gravajn eventojn ene de 350 vortoj. Fakte, mi preferas koncizajn kontribuojn ol malkoncizajn, kiujn mi devas redakti. Kaj memoru: kiel *Monato*-korespondanton vi ricevos etan honorarion.

Se vi volas verki por *Monato* mi volonte kundiskutos kun vi kaj donos pliajn informojn. Se vi ne volas verki, kaj informi pri via lando, do bone ... tamen bonvole abonu. Detalojn pri la magazino vi trovos ĉe <info@fel.esperanto.be>.

Ellie kaj la fantomo

de Johano BENTLEY

Ĉu vi kredas je fantomoj? Laŭ mi, ili ne ekzistas. Aŭ tion mi antaŭe kredis, sed nun mi ne estas tute certa.

Mi havis onklinon, kiu nomiĝis Jeannie. Mi diras 'havis' ĉar ŝi mortis antaŭ tri jaroj. Jeannie ĉiam estis sana, do ŝia morto estis neatendita. Ŝi vivis sola kun sia hundo, Ellie. Tial pasis du tagoj, ĝis finfine najbaro rimarkis, ke io misis.

Kiam Jeannie mortis, ŝi postlasis sian plej bonan amikon, sian hundon Ellie. Ili estis ĉiam kune. Eĉ kiam Jeannie vojaĝis, ŝi neniam irus ien, krom se Ellie povus esti kun ŝi en la ĉambro. Ellie estis pudelo, sed ne unu el tiaj hundetoj, kiujn oni povas porti enmane. Ne, ŝi estis granda pudelo, tute nigra. Tia speco de pudelo estas bredita por esti ĉashundoj kaj gardhundoj. Ili estas tre altaj, kaj fortaj. Ili estas ankaŭ tre inteligentaj, kaj ege fidindaj, sed povas esti tre sovaĝaj.

Tiun lastan trajton eltrovis policanoj kiam najbaro de Jeannie vokis ilin, du tagojn post kiam Jeannie mortis. Ili eniris la domon kaj trovis ŝian korpon en la litoĉambro. Sed en la ĉambro, sur la lito apud la korpo, ankaŭ estis Ellie. Ekde kiam Jeannie unue portis Ellie hejmen, kiam ŝi estis nur eta hundido, Ellie neniam volonte lasis la flankon de Jeannie, kaj ŝi certe ne planis lasi Jeannie tiam, kiam Jeannie estis 'malsana', laŭ Ellie. Policanoj multfoje provis alproksimiĝi al la korpo, sed ĉiufoje Ellie sovaĝe provis ataki ilin. Post tio ŝi

rekuŝis apud la korpo kaj tenis sian mentonon sur mano de Jeannie. Fine ili decidis pafi ŝin por ke ili povu alproksimiĝi al Jeannie. Sed feliĉe la najbaro memoris, ke li fojfoje veturigis Jeannie kaj Ellie al mia bestkuracista oficejo por ke mi povu trakti Ellie, do ili vokis min.

Kiam mi alvenis, mi povis tuj rimarki ke Ellie estas soifega kaj tre malforta. Ŝi ne povis eĉ stari sen tremado. Kiam ŝi vidis min, ŝi tuj rekonis min, kaj ne provis ataki min dum mi malrapide alproksimiĝis. Kompreneble, mi ne volis alproksimiĝi al tiu du-tag-aĝa kadavro, sed Ellie ne estus lasinta ĝin se mi simple estus vokinta ŝin. Danke al Dio, krom la mano, la kadavro estis tute kovrita per littuko kaj litkovrilo, kaj ankaŭ feliĉe, mi naskiĝis sen flarpovo. Mi neniam estis tiom dankema pri tio, kiel tiam. Mi malrapide alproksimiĝis al Ellie kaj prenis ŝian kolumon. Mi provis tiri ŝin for, sed ŝi nur retotiris kaj ŝovis la kadavron per sia nazo. Mi konstatis ke tio estis metodo per kio ŝi kutime vekis Jeannie. Mi diris kviete al ŝi, "Ŝi estas for, Ellie. Vi devas veni kun mi, nun. Venu, venu." Ellie provis denove veki Jeannie, kaj post tio, ŝi rigardis mian vizaĝon tre intense, kaj subite lasis la kadavron kaj grimpis pene desur la lito.

Ŝi estis tiom malforta ke ŝi preskaŭ kolapsis, kaj mi devis porti ŝin al mia aŭto. Hundoj ne malfortiĝus tiom ege post nur du tagoj sen akvo, do Ellie verŝajne estis



apud Jeannie eble ekde du tagoj antaŭ ŝia morto ĝis du tagoj post ŝia morto. Mi ne volis imagi, kiom multfoje ŝi provis veki Jeannie malsukcese.

Ŝajnas ke Ellie tute resaniĝis post eble du semajnoj en mia kliniko, sed ŝi neniam estis tiom gaja kaj afabla kiel antaŭe. Ŝi estis dolĉa hundo, kaj ĉiam volis dorlotadon, sed ŝi pasigis la plimulton de sia tempo nur kuŝante en sia kaĝo. Mi zorgis pri ŝi kaj mi ekzamenis ŝin multfoje kaj eĉ sendis sangtestojn al laboratorio por determini, kio ĝenis ŝin, sed laŭ ĉiuj testoj, ŝi estis sana.

Post eble kvin monatoj, ŝi ŝajnis denove gaja kaj dum unu tuta semajno, ŝi denove bojis gaje kiam iu eniris la ĉambron, kaj lekis mian vizaĝon kaj volis ludi kun mi. Je tiu semajnfino, ŝi bojis preskaŭ senĉese al la muro ekster sia kaĝo. Ŝi dancis, saltis, kaj bojis, kaj prenis sian kondukŝnuron en la buŝon. Tio estis ŝia signalo ke ŝi volis promeni ekstere. Strange, mi rimarkis ke ŝi faris tion al tiu muro, kaj ne al mi. Tiun vesperon, kiam mi forlasis la oficejon, mi povis ankoraŭ aŭdi ŝin bojanta en la kaĝo.

Matene, hundejohelpanto telefonis min. Ŝi diris ke ŝi trovis Ellie mortinta en sia kaĝo. La hundo ankoraŭ havis sian kondukŝnuron en la buŝo.

Mi neniam malkaŝis kialon de ŝia morto. Eble ŝi havis kaŝitan malsanon kion mi ne estis sufiĉe inteligenta por diagnozi. Sed ĉu vi volas scii, kion mi preferas pensi? Mi pensas ke dum tiu lasta semajno, Ellie havis vizitanton, tre amatan vizitanton. Kaj en tiu lasta punkto, mi preferas pensi ke Jeannie revenis por unu vizito pli – por havi la lastan promenon kune, tien, kie ŝi vivas nun.

Ĉu vi ŝatas ludi tabuloludojn?

Se vi ne planas partopreni en la filmado je la 2-a, kial ne provi kelkajn ludojn? En la klasĉambroj de *Flowe Hoss* gvidos kelkajn ludojn, inkluzive de:

- ★ *Vorto Mozaiko*:
krucvorta ludo el Japanujo
- ★ *Skrablo*:
eble la plej fama krucvortludo
- ★ *Mi trovis!*
esperantigita versio de *Pictureka!*

Ĉu vi havas kun vi aliajn ludojn, kiujn vi volus dividi? Kunportu ilin!

